

Laborista Esperantisto

14DE JAARGANG, NO. 3, 4 AUGUSTUS 1945
VERSCHIJNT ZO MOGELIJK MAANDELIJKS.
VOOR LEDEN GRATIS. OPLAAG 3500 EX.

Alle correspondentie betreffende de redactie en de administratie van dit blad gelieve men te zenden aan het secretariaat van de Federatie van Arbeiders-Esperantisten:
Vier Heemskinderenstraat 53 ², Amsterdam-W.

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

La lingvoproblemo inter la nacioj

Ĉe la ruinoj de Eŭropo, inter ankoraŭ nemezurebla ĥaoso, la diplomatoj interkonsiliĝas. Multe da problemoj sin prezentas, problemoj, de kiuj dependas aŭ la eblo de hominda vivo por la popoloj, aŭ griza mizero al la pli granda parto de l'homaro.

La milito renversis kaj ruinigis ne nur urbojn kaj vilaĝojn, sed ankaŭ kaŭzis ĥaoson sur ĉiuj terenoj, ekonomiaj, monaj, ŝtataj kaj politikaj.

La milito finiĝis, almenaŭ en Eŭropo. Ne plu regas perforto. De la homoj forfalis tiu angoro pro malcerto, pro malsato kaj pro detruigaj agoj. Ne plu oni estas en vivdanĝero, ne plu oni bezonas timi forkondukon al karcero aŭ koncentrejo, nek konfiskon de siaj nemankipovaj havajoj.

Alivorte, oni vivas denove pli libere ol dum la milito, kiam la malcerto pri ĉio ajn rilate al vivo, posedo kaj konduto povis esti suspektaj en okuloj de sadismaj barbaroj, fakte kaj reale disponantaj pri rajto kaj malrajto, pri vivo kaj morto de la venkitaj popoloj. Se tamen la milito finiĝis, tio ne signifas, ke la paco estas sekura. Post la scenejo ja okazas grava batalo; tamen ĝi ne estas milita kaj perforta, ĝi estas diplomata. En ĝi partoprenas ne popoloj, nek armitaj armeoj.

La homoj scivole observas ĉu eble tiu interbatalo iam stagnos, kaj ĉu eble tiam denove „parolas la armiloj, pro kiu ajn kaŭzo, aŭ sub kia ajn preteksto!" Oni scias, ke la finiĝo de la milito ne dependas nur de la venko de l'„aliancanoj" super la „akso", sed ke restas la inklino de ĉiu ŝtato plibonigi sian pozicion, senecese malprofite al aliaj. Potenco estas faktoro decidiga, kaj la tuta historio instruas nin, ke plej ofte humanismo estas sensignifa aŭ nekonata vorto, kiam ŝtata forto permesas al si ignori tiun idolon.

Ni komprenas ĉu konscie, ĉu subkonscie, ke ankaŭ nun tio ludas gravan rolon en la politika areno. Tial la homoj klopodas influi tiun situacion. Estas la demokratio, kiu povas servi al tio. Ĝi ebligas la kontrolon kaj prijuĝon super la konsideroj de la homoj, ĝi ebligas al la popolo konigi siajn ideojn, dezirojn kaj volon, ĝi do povas bremsi la inklinon de la diplomatoj, kiuj siavice respondecas pri la favoro por la propra ŝtato.

Kiam ni aludas pri la gravo de la demokratio ni tamen ne povas ne atenti, ke ĝi manifestas sin limigite nur en la respektivaj ŝtatoj, kaj ne estas tutmonda. Ni do komprenu, ke ankaŭ la demokratio, spite al la kontrola efiko, en sia nuna nacia formo povas kaŭzi eĉ danĝeron. Estas ja fakto, ke la favoro, ankaŭ eĉ se ĝi estas stimulata kaj portata de la demokrata influo, en iulando povas malutili al aliaj landoj. Tio ne okazos pro la demokratio, sed malgraŭ, ĉar la fatalo en diverseco de autonomaj ŝtatoj estas la izoliga faktoro. Ili ne akcelas antaŭ ĉio al la favoro por la tutmonda homaro, sed al plifortigo de sia propra pozicio.

Koncerne ekzemple Eŭropon, ni povus aludi eĉ pri tutkontinenta enloĝantaro anstataŭ pri tutmonda. Simpla rigardo sur geografian karton de Eŭropo sufiĉas por konvinki nin pri ĝia displitiga karaktero. Konsiderante, ke pri la produktoj de l'eŭropa grundo senpere ne ĉiuj popoloj povas disponi, oni komprenas, ke facile estiĝas konfliktoj. Kaj tio ne nur koncernas la produktojn de la grundo, sed ankaŭ la regon super maroj por plisekurigi sian strategian pozicion en okazo de milito.

Ekzemple nun okazas i.a. la grava diplomata batalo super la Mediteraneo. Estas faktoro, kiu ne dependas de la demokratio en sia nuna formo, ĉar ĝi ne estas tutkontinenta, kaj, kiel ni en ĉi tiu artikolo jam aludis, demokratio inter la ŝtatoj regas nur iagrade laŭ diplomata ordo, kiu tamen laŭhistorie decidige estas influata de konsideroj pri potencaj ebloj, cetere dependaj de la politika ekvilibro inter la respektivaj ŝtataj aliancoj. Prefere ni ne neglektu tiun fakton. Rilate al klopodoj por plibonigi tian staton oni konscias, ke necesas pli celtrafaj aranĝoj ol la iama Ligo de Nacioj.

Ankaŭ konsidere la nunajn klopodojn por trovi bazon de kunlaboro inter la ŝtatoj oni ĝenerale ne havas multe da fido pri ĝia efiko. Oni denove baraktas en la nepraj gardoj de ĉiuj ŝtatoj al sia aŭtonomeco. Tio manifestas sin sur ĉiuj tiurilataj terenoj, ankaŭ ĝi ekzemple estas bone konstatebla koncerne la konsiderojn rilate al la kompenso de perdoj kaŭzitaj de la milito. Estas kompreneble, ke la venkitaj popoloj devas atribui al tio. La aranĝoj estas diversaj. Ili devos i.a. liveri laborforton por la rekonstruo.

Pri tio ne necesas multaj paroloj, la venkintoj nur bezonas dividi inter si la disponeblan kvanton da laboristoj. Sed estas alia aranĝo, kiun la diplomatoj pli diskrete devas pritrakti, nome la anekson de grundo. Por la plej potencaj ŝtatoj, tiu konsidero ne estas tiom grava. Ilia pozicio permesas al ili pli facile aranĝi tion. Ili ne bezonas timi gravan malkontentan „malplimulton", ĉar la eventuala aneksota parto estas bagatela kompare al la grandeco de la ŝtato, kaj cetere ĝi facile povas politike influi apudan ŝtateton. Estas cetere la konsekvenco de imperiaj potencoj, ke ili ne evitas anekson. La politiko de tiaj ŝtatoj ja estas bazita sur tiu historia evoluo.

Tamen iom singardaj oni tiurilate estas, kaj precipe la malgrandaj ŝtatoj kondutas al tiuj allogajoj kiel kato al telero kun varmega kaĉo.

Humanistoj diras, ni ne suferu tiun vojon, ĉar anekso signifas novan militon. Aliaj proponas diversajn aranĝojn, kiuj devas eviti eventualajn malfacilajojn. Oni defendas ĝin kiel nuran

eblon de kompenso. Sed super ĉio ni komprenu, ke la fatalo ne kaŝas sin en (eventuala) anekso **nun**, sed jam en la historio, kaj ĝi ne estas ŝanĝebla. Ĉu anekso aŭ ne, la ŝtatoj devas akcepti la konsekvencon de sia ekzisto, sia izoleco kaj la nepra bezono por defendi sian aŭtonomecon.
Estas vere, ke Ĉeĥoslovakio, kiu post 1918 grandparte konsistis el aneksitaĵoj ne povis eviti la duan mondmiliton, sed ekzemple Nederlando kaj Norvegio, kiuj ne aneksis grundon tamen ankaŭ ne restis netuŝitaj. La plej grava problemo do nun ne estas la anekso, ĉar evidente oni tamen ne sukcesos eviti militon en la estonto, se oni ne trovos la vojojn, kiuj kondukos al tutkontinenta demokratio kiel unua paŝo al la tutmunda, kiel krono super ĉio. Sed pri tio nun okupas sin ne la diplomatoj.
Apud tendencoj, kiuj konscie akcelas la aplikon de certaj aranĝoj aŭ metodoj por efektivigi tion, influas la nuna kaj fakta situacio, kiu estas subtenata de konservativaj tendencoj, kaj kiun situacion ankaŭ la antaŭe nomitaj ne povas malantenti. Instrua pri tio jam estis la konsideroj en la progresema kampo pri „revolucio aŭ evoluo".
Estos du vojoj, kiuj eble interplektiĝas.
La estonto iam montros al ni la gravon de tio, kion oni nun entreprenas por sekurigi al la popoloj la pacon.
Sed ĉiuj komprenas kiel malfacila tiu tasko estas, despli ĉar neniel montriĝas, ke la ŝtatoj pretas forlasi eĉ eron de sia aŭtonomeco. Tamen ni konsciu pri tio, ke por efektivigi tion ni kapablu sur la altaro de vere tutmonda demokratio oferi tion, kio al ni ŝajnas plej sankta, nome la izolon en ŝtatoj. Ni devas konkeri senliman grundon. Por tio necesas antaŭ ĉio forigi la lingvajn barojn.
Ke tiu inklino al izolo estas grava faktoro ankaŭ lingva montriĝas jam en diversaj landoj, kie pluraj lingvoj estas uzataj, kaj ne estas utopia la konsidero, ke pro tiu diverslingveco en unu lando povas okazi konfliktoj. Atestas pri tio ankaŭ senkulpa esprimo de la belga ministro Spaak, kiu rilate al anekso en intervjuo al ĵurnalisto rimarkigis: „Eŭpen kaj Malmedi kompreneble fariĝos belgaj. Pri tio ne ekzistas dubo. Sed ni ne deziras pli. Anekson ni ne volas. La lingvodiverseco en Belgio jam troas."
Por **konstrui la pacon** necesas solvi la lingvoproblemon inter la popoloj. Al tio servas Esperanto kiel neŭtrala lingvo, kiu, laŭ lingva vidpunkto, al neniu nacio donas superon, ĉar ĝi estas lingvo al ĉiu homo kaj al ĉiu popolo egala.

† FUNEBRA KOLONO †

En funebra honoro ni memoru la gekamaradojn, kiuj dum la milito forfalis el niaj vicoj pro morto.
Batalante por nia komuna idealo, pluraj estis mortpafitaj de barbaraj perfortuloj, aliaj mortis rekte pro aŭ kaŭze de militagoj, kelkaj pro malsano.
Ili estis laborantoj por paco kaj humanismo, por frateco kaj socialismo.
La sorto ne ebligis al ili vidi la aŭroron de nova epoko, eble al ilia idealo multpromesa.

Ch. v. Ast
aktivulo en sekcio Rotterdam II; mortis en Germanio.

Ludwig Belitzer
ĥorestro de la amsterdama esperanto-kanthoro „La Nova Tempo"; mortis en Aprilo 1945 en koncentrejo.

J. W. de Blaey
ano de sekcio Sliedrecht; mortpafita de la germanoj pro partopreno en la striko en Majo 1943.

L. Boslooper
iama sekretario de la distrikto Rotterdam.

D. Bourguignon
aktivulo, kaj iama prezidanto de la distrikto Rotterdam.

Jetty Colijn
anino de la infangrupo de sekcio Vlissingen; mortis pro bomboatako en Aprilo 1942.

Joost Darphorn
ano de sekcio den Helder; mortis en koncentrejo.

Joh. Duinker
aktivulo, iama estrarano de sekcio Teksel; mortpafita de la germanoj okaze de la ribelo sur la insulo Teksel en Aprilo 1945.

K-do den Exter
ano de sekcio Souburg; mortis pro bomboatako en Januaro 1943.

K-do Gelderman
ano de sekcio Enschede; mortigita de la germanoj.

K-do Geldof
ano de sekcio Middelburg; mortis pro bomboatako en Januaro 1945.

K-do Gellekink
ano de sekcio Enschede.

A. J. Hekxpoor
aktivulo en sekcio Delft; mortis pro fabrikakcidento.

G. Konings
ano de sekcio Enschede; mortis pro bomboatako en 1942.

K-do Kroll
aktivulo en sekcio Waubach, kaj S.A.T.-peranto; mortis en koncentrejo.

K-dino Lamijn
estraranino de sekcio Vlissingen kaj gvidintino de la esperanto-kursoj por infanoj.

P. J. Makkinje
aktivulo en la distrikto den Haag, iama ano de la Literatura Komitato de F.L.E.

D. Meyer
prezidanto de sekcio Amsterdam IXa; mortis en 1943 en koncentrejo en Hamburg.

K-do Muuren
estrarano de sekcio Schiedam; mortis en koncentrejo.

K-do Schillings
ano de sekcio Waubach; mortis en koncentrejo.

K-do Strating
estrarano de sekcio Heerlen; iama konsilantarano, kaj prezidanto de la distrikto Limburg.

J. Verheyke
ano de sekcio Vlissingen; mortis pro granadeksplodo en November 1944.

Th. Versteeg
sekretario de sekcio Amsterdam Ia; mortis en koncentrejo en Hamburg.

K-do Westdorp
aktivulo en Rotterdam, kasisto de la distrikto Suda Hollando.

K-do Zijlstra
estrarano de sekcio Heerlen.

FEDERACIA ESTRARO.

EKLEVU STANDARDON

Ek! Amikoj al la laboro!
Ek! Ŝiritaj estas katenoj
nin ligintaj! Vigla fervoro
akompanu! Malgraŭ la penoj,
zorgoj, baroj, kun ardo patosa
ni aktivu en mondo ĥaosa!
Pli ol antaŭe fekundas la tero.
Se lingvaj muroj konsistus el fero,
ni agu, fervoru kaj penu, batalu,
ĝis ili pereu, kaj salte disfalu!
Amikoj perdiĝis multope, po miloj
La fratoj faladis, gepatroj, gefiloj
Kaj nia afero nun kuŝas frapite
pro kaŭzo milita, pro fia teruro.
Eklevu falintan standardon rapide!
Trumpetu signalon tra l' monda (murmuro,
ke aŭdu ĝin ĉiuj en loko plej fora,
ke ulo inerta fariĝu fervora!
La faroj de l' fratoj prenitaj de l' morto
Ekzemplas al ni el transtomba la sorto,
kaj servas al ni kiel sankta simbolo.
Eklevu standardon kun firma la volo!

GERRIT KALKMAN.

RAPORTO de la Federacio pri la periodo 1940a ĝis la fino de Julio 1945a

En L.E. de Jan. 1941a ni aperigis raporton pri la Federacio en la jaro 1940a, sed memkompreneble ni ne povis komuniki ĉion, kio eble interesus najn membrojn, ĉar ni devis atenti la scivolon de niaj „neinvititaj gastoj". Pro tioj ŝajnas al ni bone ĉi tie kompletiĝi nian tiaman raporton, por ke oni havu plenan bildon pri tio, kio okazis al nia organizo kaj kiel la fed.-estraro traktis la diversajn problemojn.

Tuj post la okupado la fed.-estraro kunvenis kaj konsideris la demandon pri daŭrigo aŭ ĉesigo de nia laboro. Unuanime ni decidis daŭrigi, kiom longe ni povos fari tion sen perforto al nia afero. Tiucele ni sendis cirkuleron al la estraroj de la sekcioj kaj distriktoj, instigantan ilin daŭrigi. Tamen la fed.estraro konsciis, ke nia organizo pro siaj ideoj kaj celo, rekte kontraŭaj al tiuj de la okupintoj, eniros malfacilan periodon, kiu eble entenos diversajn surprizojn. Post la uzurpo de diversaj organizoj de la laboristaro ni opiniis utila, doni iajn gvidliniojn al la sekcioj, por ke ne okazu ia miskompreno pro la neeblo libere informi la membraron. Tiucele la membroj de la fed.-estraro partoprenis malgrandajn kunvenojn, ĉie en la lando, kie ni kontaktis kun la ĉefaj aktivuloj. Ni prezentis nian vidpunkton kaj donis konsilojn kaj informojn. I.a. ni konsilis sendi eventualajn saldojn al la Libro-Servo por sekurigi la monon, kaj krome ni atentigis, ke la fed.estraro neniam libervole akceptus kontrolon, kian suferis aliaj organizoj. Se do venus ia sciigo pri kontrolo oni tuj amase forlasu la Federacion, sendepende de eble eldevigitaj paroloj de la fed.estraro. Nia propono sekurigi la monon ne estis tre eluzata, nur kelkaj utiligis tiun ĉi okazon por savi la monon.

Kontrolo super nia organizo ne venis, ŝajne la sperto, ke la laboristoj ne lasas sin kapti per tia artifiko, kaj la cirkonstanco, ke eble estis tro malfacile trovi rimedon, utiligi nian organizon por faŝistaj celoj decidigis al plena likvido, kiu okazis je la 21a de Marto 1941a.

Ĉar ni kalkulis ankaŭ pri malpermeso, ni antaŭe jam faris kelkajn plenumojn, por ke la perdo estu plej eble malgranda. Tiel ni grave reduktis nian bonhavon ĉe la ĝiro kaj nian kasmonon per plirapidigita pagado al kreditoroj. Hazardaj cirkonstancoj tamen kaŭzis, ke ĝuste en la momento de la konfisko la bonhavoj estis iom pli grandaj ol ni fakte deziris.

Frue en la mateno je la 21a de Marto 1941a sin anoncis kelkaj nederlandaj policanoj ĉe la prezidanto, la sekretario, kaj la kasisto de la Federacio kaj komunikis, ke laŭ ordono de la regna komisaro la Federacio de Laboristaj Esperantistoj estas likvidata, ĝiaj posedaĵoj konfiskataj. Krome ili menciis, ke ni ne rajtis plu eldoni niajn organojn, kaj ke la estraranoj ne rajtis plu daŭrigi siajn funkciojn.

Niaj perdoj.

Niaj perdoj sumas entute: 2 skribmaŝinojn, kelkajn ŝranketojn, kasmonon de f 158.44 nian saldon ĉe la Poŝtĝiro je f 545.62 kaj ĉe la Komunuma ĝiro f 45.23 kaj la diversajn kaslibrojn, krom la vortaron de k-do v. d. Eijnde, konsistantan el ŝliparo, super kiu li laboris multe da jaroj.

Pri la Libro-Servo okazis nenia esploro kaj pro tio ĉio saviĝis. Por ke ankaŭ estontece ne okazu io, ni cedis (ŝajne) ĉiujn niajn posedaĵojn al iu firmo kiel certigon por nia ŝuldo. Ni tamen poste neniom plu aŭdis. Pro la maleblo regule kontroli la aĵojn de la Libro-Servo ni suferis iajn perdojn pro akvodifektado. Grava la perdo feliĉe ne estis.

Agado post la malpermeso.

Post la malpermeso la membroj de la fed.-estraro daŭre kontaktis kaj priparolis la diversajn problemojn. Ĉefan atenton havis la paŝoj farotaj post la liberiĝo. Dum longa tempo ili ne fariĝis aktualaj. Nur post Septembro, kiam la venonta liberiĝo fariĝis pli videbla ni povis transiri al pli definitaj decidoj. Tamen la finperiodo stariĝis tian ĥaoson, ke la efektiviĝo de niaj laboroj i.a. la forsendo de ĝenerala alvoko estis forte malhelpata. Kaj anstataŭ unu aŭ du tagojn ni bezonis du semajnojn por plenumi la laboron. Praktike la stagno ne alportis multe da ĝeno, ĉar oni diversloke ne havis okazon tuj agadi laŭ niaj direktivoj. La vivo estis tro forte skuita.

Ankaŭ dum la milito la Libro-Servo ankoraŭ iom funkciis kaj ni plenumis kelkajn liverojn. La vendadon ni ne stimulis tre multe, ĉar per tio ni ne nur akceptus grandan riskon por la libraro, sed ni akceptus la riskon sen ia profito, ĉar dum la milito la aparato ja bezonis neniom da mono kaj varoj estis pli sekuraj ol mono

Post la liberiĝo.

Kiel ni jam diris, ni forsendis plej eble baldaŭ alvokan cirkuleron. Por tiu celo ni disponis nur pli malnovaj adresoj el 1941a. Kompreneble centoj da cirkuleroj neniam atingis la adresiton, sed aliflanke pluraj trafis en la ĝustajn manojn kaj tiel atingis la deziratan rezultaton. Krome ni ankoraŭ diskonigis nian reaktiviĝon per anonco en kelkaj maldekstraj gazetoj: Het Parool, Het Vrije Volk kaj De Waarheid. Ankaŭ laŭ tiu vojo multaj povis retrovi la kontakton kun ni. Kun Dico ni tuj pritraktis la eblojn, rilate reeldonon de L.E., la legantoj konas la rezultaton: hodiaŭ vi havas en la manoj jam la trian numeron. Nur La Progesanto ankoraŭ mankas al la plenumiĝo de ĉiuj niaj deziroj. En la dua parto de Junio ni sukcesis ankaŭ aperigi Interkontaktilon

La rezultato de la ĝisnuna laboro.

Pri la rezultato de la ĝisnuna agado ni ne povas esti malkontentaj. Kompreneble ni ankoraŭ ne enskribis 5000 membrojn, sed la fakto, ke post iom pli ol du monatoj jam enviciĝis multaj gek-doj, subtenas nian esperon, ke ne daŭros tro longe ĝis kiam ni ree proksimos al nia rekorda membronombro. Tamen ni ne atingos tion senlabore.

Por ke oni havu ian superrigardon ni ĉi sube donas kelkajn ciferojn pri niaj nuna kaj antaŭaj membronombroj.

Je fino de la jaro	1939	1940	Julio 1945
sekciaj	3837	1881	1744
ĝeneralaj membroj	132	47	56
	3969	1928	1800

Ni havas entute 63 sekciojn en 49 lokoj. Kun niaj flandraj sekcioj ni ankoraŭ ne povis akiri kontakton, sed ĝenerale la rilatoj kun la eksterlando estas ankoraŭ malglataj.

La estraro.

La nuna estraro konsistas el: A. Veen, Prez. kaj Red. L.E.; W. F. Kruit, Sekr.; J. Pouli, kasisto, kaj H. P. Schoonenberg, A. v. Haren, C. Prins, F. de Vries, A. Lafeber kaj F. G. Kroonder, asesoroj. K-do F. Faulhaber ofte partoprenis, kiel honora prezidanto, la kunvenojn de la fed.estraro. K-do H. P. Schoonenberg estis en 1941a kandidato por la fed.-estraro, anstataŭe de k-dino Faulhaber. Pro la malpermeso li ne povis oficiale eniri la estraron. Ĉar nun finiĝis ankaŭ la mandatoj de la aliaj estraranoj, pro kio la tuta estraro fariĝis provizora, ni permesis al ni peti al k-do Schooneberg jam tuj partopreni niajn laborojn kaj same funkcii kiel provizora estrarano. Pro la transloĝiĝo de k-do Kroonder al Bussum, nun k-do J. Pouli prizorgas la Libro-Servon atende al definitiva reguliĝo.

Diversaĵoj.

La aliaj instancoj en nia Federacio kiel ekz. Intrua Servo, Infanmovado havas nian atenton, sed nenio ankoraŭ konkretiĝis.

Ekzamena Komitato.

La Ekzamena Komitato restariĝis kaj, se prezentiĝos sufiĉe da kandidatoj, jam ĉijare okazos denove ekzamenoj.

Rilatoj kun aliaj enlandaj kaj eksterlandaj esp. organizoj.

En la momento, kiam ni verkis tiun ĉi raporton ni ankoraŭ ne sukcesis starigi firmajn rilatojn kun la eksterlando. Entute ni ricevis nur unu poŝtkarton el Anglio, tio estas ĝis nun nia tuta eksterlanda korespondado.

Ankaŭ enlande ni ne povis jam multe kontakti kun la aliaj Esp. organizoj. Ili ankoraŭ ne sukcesis plene solvi la problemojn de la refondado. Espereble ankaŭ tio baldaŭ ŝanĝiĝos favore al la progresiĝo de la komunaj celoj.

Laboristo Esperantisto.

En la jaro 1941 povis aperi ankoraŭ 3 numerojn de L.E. Tiam, en Marto, okazis la subitaj sed atenditaj konfisko kaj likvido. En tiu mallonga tempo ĝi tamen plenumis sian taskon. Kontrolon fare de germanoj ni ne spertis. Ni ricevis regule iun bultenon, kiu devis servi al la gazetaro.

En ĝi oni povis legi kion oni ne presigu. Ankaŭ instigojn por publikigi certajn komunikojn ĝi enhavis. Ni rilate al L.E. tamen malatentis ĝin, ĝian enhavon ni tamen ĝenerale ne malatentis, ĉar ofte la novaĵo, kiun oni malpermesis aperigi estis interesa.

Poste ni eĉ legis en ĝi, ke oni provizore neniom publikigu en la gazetoj pri la malfunkciigo de la Esperanto-organizoj ĝis kiam ili donos pli da informoj. Kompreneble ni vane atendis ilin.

Releginte tiujn 12 paĝojn de L.E., kiuj aperis en 1940, ni povas konstati, ke ili atestas, se ne pri kresko de la Federacio, tamen pri serioza laboro por kiel eble plej prepari nin por malfacila kaj al nia movado danĝera estonto.

Ĝi estis la perantilo inter la anoj por ilin instigi al preparo de kaj al fido al nia povo por venki la barojn kaj savi nian organizon. Kaj kiam la bato al nia Federacio okazis, ni estis pretaj, profunde kaj konscie ni estis certaj, ke ni kapablos rekonstrui ĝin iam. Kaj ankaŭ en tiuj jaroj poste ni ne perdis la esperon. Kiam en Majo 1945, 3 semajnojn post la tago de la liberiĝo, aperis denove L.E. ni ricevis multajn gratulojn.

Ne estis pro tio ĉar oni iam dubis pri la reaperigo, sed estis esprimoj de ĝojo pro la revido. Kian taskon ĝi plenumas inter ni kaj por nia organizo ni eble nun ekkomprenis.

Ni esperas, ke ni sukcesos regule aperigi ĝin. Multon ni tiurilate ŝuldas al nia presejo „Dico", kiu ĉiel klopodas helpi nin. Pro la nunaj cirkonstancoj ĝia aperado ne povas esti absolute sekura, tamen ni espera, ke en la daŭro de la tempo, ankaŭ nia organo povu pliboniĝi rilate al amplekso, paperkvalito kaj regula apero.

Fed.sekretario.

INGEZONDEN

De duitse esperantist . . . . .

Er moge variatie zijn in de gevoelens die men koestert t.a.v. het duitse volk, zij komen toch grotendeels hier op neer, dat men op z'n minst met duitsers niet van doen wil hebben. Welke invloed deze oorlog op de duitse geest heeft gehad, valt nog moeilijk te bepalen: mag men de berichten geloven dan is de pruisische geest wezenlijk pruisisch gebleven.

Met die Duitsers willen wij dan ook niet rekenen, of het moet al zijn, dat wij hun de straf toedenken die zij verdienen.

Een andere zaak is echter, dat ook in Duitsland strijd tegen het nationaal-socialisme is gevoerd, dat ook in de bakermat van het nationaal-socialisme zelf duizenden mensen naar de concentratiekampen zijn gesleept, om hun politieke of godsdienstige overtuiging. Wij herinneren aan ds. Niemöller, maar vooral ook aan de uitgeweken joodse schrijvers. Zij behoren tot de groten, maar er zijn ook de kleinen. Het wil zeggen dat ook daar geesten zijn, die verlangen naar het gezamenlijk beleven van een ideaal, dat ook daar harten zijn, die snakken naar wat warmte, naar kameraadschap. En zij zijn er, nederlandse kameraden, zij zijn er!

Men versta goed: niets, **maar dan ook niets,** willen wij rechtpraten van de misdrijven, door de Duitsers begaan, maar men versta goed: er bestaat nog een duits volk, en het zal moeten blijven bestaan, wil men het althans niet geheel en al verdelgen, dit duitse **volk, nederlandse kameraden, zal mee moeten doen in de strijd om vernieuwing, in welke vorm en onder welk gezag dan ook.**

Wij spreken hier niet van de duitse staat, wij spreken hier van de samideano die als wij, gezucht heeft onder de gruwelijke druk van het duitse barbarisme.

Wanneer wij zingen, eindelijk, en als vrije mensen, la Internacion, dan is er een verre broeder die mee zou willen doen, uit het diepst van zijn hart mee zou willen, **want nog langer dan wij heeft hij moeten zwijgen.** Men moge dit zwak humanisme of slapheid of wat dan ook noemen: **Wij** zijn Esperantisten, wij zijn hopenden, niet alleen t.o.v. onze internationale taal, maar vooral t.a.v. de gehele mensheid.

Wanneer dan ook het federatie-bestuur meende, N.S.B.'ers en aanverwanten, van ons werk te moeten uitsluiten, dan is dit haar recht en haar plicht: niemand van ons zou anders verwacht hebben.

Maar onze duitse kameraden mogen wij niet vergeten: Zamenhof zou niet anders verwachten.

Bovenstaande is, tenslotte, een persoonlijke mening, en zij wil niet kategorisch zijn. Een ieder kan over dit punt een eigen mening vormen.

Maar steller zou alle arbeiders-esperantisten op het hart willen drukken:

ne forgesu la fraton garmanan!

Juni 1945. HENK HEERES.

Nekrologo

Ni sciiĝis, ke la 27an de Aprilo en Noordbroek, kiel li restadis pro evakuo, mortis la konata esperantisto

H. J. BULTHUIS.

Li estis unu el la unuaj esperantistoj en Nederlando.

En 1901 li konatiĝis kun la lernolibro de D. Uiterdijk kaj de tiu tempo fariĝis esperantisto. En persista kaj longdaŭro agado por Esperanto li famiĝis sin kiel aŭtoro de kelkaj originalaj esperanto-verkoj kaj kiel tradukinto de pluraj libroj. Kiel sekretario de Ekzamena Komitato li estis konata en ĉiuj rondoj esperantistaj en Nederlando, ankaŭ kiel gvidanto de skriba kurso li plenumis gravan laboron por la esperantista movado.

En la jaro 1910 li estis elektita en la Lingva Komitato. Senlace li laboris por Esperanto. Admirindaj estis liaj povo kaj persistemo se oni konsideras ke li restis plenumantaj diversajn gravajn laborojn en aĝo kiam plejmultaj estas devigataj ripozi kaj mallabori. Li atingis la aĝon de 79 jaroj kaj neniam ĉesis en siaj klopodoj ĝis kiam la milito malebligis tion.

Ĉe la rekonstruo de la esperantomovado en nia lando li ne plu povos daŭrigi sian laboron. Al la esperantistaro li tamen postlasis multon voloran, kiu neniam povos perdiĝi.

Ni memoras lin en estima funebro.

REDAKCIO L.E.

MI ESTIS BATALANTO

Mi estis iam batalanto,
Por ĉarma lingvo Esperant',
Mi estis arda junamant'
Ravita de la sorĉa kanto.

Nun ne plu brilas Diamanto,
Frakasis ĝin la homa vant',
Nun morta kuŝas juna plant'
Sub fera bato de giganto.

Sed kiam sonas pri la Paco,
Sur tuta tero la trumpet',
Vekiĝos mi el dorma laco.

Ne plu parolos bajonet',
Sed rekreiĝos pacpalaco,
Kaj mi asistos per ŝtonet'.

ADRIAAN KLOEK.

Dum Eŭropo sangas 1941.

Het is nog als vanouds

In Het Vrije Volk van 16 Juli j.l. lazen we over de conferentie te Potsdam: „Tenslotte ging het naar het vliegveld Brusselse vanwaar Truman naar Potsdam vertrok. Vlak voor het vertrek van het vliegtuig snelde de Belgische premier Van Acker het vliegveld op voor een officiële begroeting. Truman klom uit het vliegtuig, schudde Van Acker de hand, **doch kon diens rede in het Frans niet begrijpen".**

Leuk zo'n ontmoeting van twee vooraanstaande staatslieden, die elkaar de hand drukken en waarvan de één er geen flauw benul van heeft waar de ander nu eigenlijk over praat. Zouden ze er het potsierlijke nu zelf niet van inzien? De correspondent, die het bericht doorgaf, blijkbaar niet, want hij vermeldt het feit zonder enig commentaar alsof het iets heel gewoons is. Als verschijnsel is het natuurlijk gewoon, en zal het gewoon blijven, zolang men het Esperanto-ei van Columbus voorbij ziet en voort gaat zich te vermeien in allerlei vernuftige uitvindsels, die op z'n best genomen alleen enige verbetering in de vertaaltechniek hebben gebracht.

Ook de oplossing van het vraagstuk door middel van de toepassing van het engels als internationale taal, schijnt er niet heel erg in te willen. Ter gelegenheid van de conferentie in San Francisco lazen we althans van een protest van De Gaulle in verband met de uitsluiting van het frans als congrestaal. En nu moeten we niet denken, dat die uitsluiting van het frans verband hield met een exclusief gebruik van het engels, want het russisch werd ook gebezigd. Enfin, zou er niets voor te zeggen zijn om ook het russisch op de middelbare scholen in te voeren, en dan maar meteen maleis en spaans ook, want die talen worden ook steeds belangrijker. En de tijd ervoor is makkelijk te vinden. Naast de talen worden er ook nog steeds enige vakken van weinig nut als wiskunde, scheikunde, geschiedenis, aardrijkskunde, boekhouden, enz. onderwezen, die best een flinke aderlating kunnen ondergaan, want voor onze geestelijke vorming is het brabbelen in een aantal talen toch veel belangrijker dan enige kennis van bovengenoemde vakken. Of zouden zij misschien nog eens in gaan zien dat Esperanto toch voordeliger is? W. F. K.

Esperanto helpis min

Dum tiu ĉi milito miloj el ni estis devigitaj labori eksterlande. Multaj tie interkontaktis kun laboristoj diversnaciaj. Rusoj, poloj, francoj, italoj, k.t.p. Ili ĉiuj klopodis kompreniĝi sin germane, tiun ĉi lingvon oni konsideris tie ĉi kiel internacian lngvon. Sed kiom da malfacilajoj tio kaŭzis! Kiu ruso, polo aŭ kiu ajn eksterlandano sukcesis esprimi sin germanlingve? La nura „Nix verstehen Kamerat" estis la ĝenerala respondo al demandoj, faritaj al ili.

Ankaŭ mi, kiel kontoristo, laboris tie en granda fabriko en Berlino, kaj ĉiutage mi travivis kaj observis la malfacilajojn kaj la el tio rezultantan malordon. Ĉe la salajropagado min atingis multaj, diverslingvaj blasfemoj, sed neniu kapablis, pro reciproka nekompreno, bone solvi ian eraron. Tie mi travivis la samajn malfacilajojn, kiuj inspiris d-ron Zamenhof krei internacian komprenilon, tie mi sentis min „malgranda" malgraŭ mia scio de tri lingvoj.

Iutage alvenis por labori en la fabriko transporto da italaj militkaptitoj (Bodoglio-anoj), kaj meze de denove aperantaj, nekomprenebla disputoj mi demandis: „Kiu el vi parolas Esperanton?" Kaj okazis io neatendita: iu respondis min en Esperanto. La koncernata itala soldato kaj mi estis la interpretantoj kaj per tio la afero fariĝis komprenebla, kaj ĉiu poste sciis, kiom li bezonis scii.

Post kelka tempo la germanoj devigis min iri al Norvegio, Oslo estis mia laboreterno. Montriĝis, ke en tiu lando ne ekzistis malpermeso al Esperanto. Jam baldaŭ mi renkontis norvegan esperantiston, kiu invitis min viziti ilian konversacio-vesperon. Tre intimaj kaj amikaj fariĝis niaj rilatoj. Mi tute ne sentis min en fremda lando, niaj paroloj plene forgesigis al mi mian situacion en tiu lando. Kiam mi ricevis la novan germanan ordonon pretigi min por foriro el Oslo al Narvik, miaj novaj amikoj tuj proponis al mi kaŝi min, ĉar laŭ ili la germana kapitulaco estis tre proksima.

Kaj vere, post unusemajna kaŝado miaj esperantistaj amikoj vekis min frue en la mateno. Gratulante min, ili tuj proponis al ni resti ĉe ili tiom longe, kiom necesas mia restado en Oslo. Tamen baldaŭ ordono de la angloj devigis la eksterlandanojn prezenti sin kaj sekvis resendo al la diversaj patrioj.

Tiuj ĉi travivaĵoj plifortigis mian opinion, ke sen internacia lingvo sen Esperanto, la laboristaro neniam sukcesos atingi la realigon de sia idealo: „Laboristoj ĉiulandaj, unuiĝu!"

A. D. M. KORFF.

Sur erara vojo

Komence de Julio la estraro de la R.-dama Distrikto ricevis de la sekretario de la esp. unuiĝo „Merkurio" (sekcio de N.E.G.) inviton por partopreni kunvenon. Tiu kunveno antaŭis grandskalan kunvenon, en kiu parolados sinjoro Cseh, kaj la celo de la invitinto estis veni al kunlaboro kun ĉiuj esp. asocioj en R'damo por nomita kunveno.

Kompreneble ni ĝojis, ke jam anoncis sin okazo por kunlaboro inter la diversaj esp. asocioj, ĉar ja estis nia intenco kunagadi, kiam temos pri grandaj okazontaĵoj kun tuturba karaktero. Nu, povi aŭskulti famulon kia sinjoro Cseh, certe estas sufiĉe grava por ni ĉiuj. Sed nia ĝojo daŭris ne longe, ĉar en la kunveno oni sciigis al ni pri kiu temo sinjoro Cseh parolados kaj kio estas lia celo. Li jam pli frue oratoris en Hago, publikigis tie, ke li fondis „Universalan Ligon" por la disvastigo de Esperanto. La celo de tiu „Ligo" estas kolektadi por deklaracio subskribojn de tiuj, kiuj simpatias kun Esperanto kaj ĝin rekomendas al la oficialaj instancoj por ke ĉi tiuj, konvinkitaj pri la popularo de la lingvo, pli facile estu persvadeblaj. Ĉiu subskribinto devas pagi almenaŭ 25 cendojn. Farinte tion, oni estas ano de la „Universala Ligo". Plie oni legas i.a. en la deklaracio, ke oni formu rondojn por instrui la lingvon al tiuj, kiuj eventuale ne kontentas pri nura subskribo, sed kiuj ankaŭ volas lerni la lingvon.

Ni ne intencas uzi la spacon de L.E. por trakti la demandon, ĉu tia Ligo estas dezirinda, sed ŝajnas al ni necese atentigi la legantojn, ke ĉi tie denove temas pri unu el tiuj **privataj entreprenoj,** en kiuj plene mankas la principoj de aŭtentika asocia kun la **ordinaraj demokrataj rajtoj** por la membroj. Ke tiaj entreprenoj povas kaŭzi grandan konfuzon inter la esperantistaro, ke ili de neniu estas kontroleblaj (ankaŭ ne koncerne la financan flankon), ke do nur unu persono havas la tutan respondecon, ĉiu tuj komprenos, kaj jam pro tio ili ne meritas nian subtenon. Sendube sinjoro Cseh havas bonajn ecojn; li jam multe faris por Esperanto. Sed montriĝas, ke li tro emas al individua aktiveco, ankaŭ tie, kie li nepre **bezonas la organizitojn** kaj la organizojn, kiujn li volonte uzas por siaj privataj aferoj.

La invititaj instancoj do unuanime rifuzis kunlabori al kunveno, en kiu sinjoro Cseh intencis propagandi sian „Ligon" kaj ili devis postlasi la invitinton en grandaj zorgoj, ĉar li jam luis multekostan salonon. Sed tio ne estas nia kulpo. (Ankaŭ tiu luo estis antaŭtempa.)

Dezirante nian kunlaboron, **oni agu pli laŭ organizaj reguloj.** Ignorante la demokratajn principojn, oni estas sur erara vojo.

B. W.

OPNIEUW AAN DE STUDIE

Lang is de onderbreking geweest van onze studie, en vreselijk haar oorzaak, maar noodlottig is ze noch ons, noch onze beweging geworden. Een idealistische beweging als de onze kan niet vernietigd worden, zelfs niet door een oorlog, des te minder door een ruw ingrijpen van een modern barbarendom. Dit laatste moge ons een aansporing zijn des te intensiever het werk, met zijn op de vrede gericht doel, te vervolgen. Een zekere belemmering daarin voelen we echter in het feit, dat onze kennis van de taal door deze lange onderbreking geleden heeft. Wel hebben sommigen onzer nog enig persoonlijk contact gehouden en Esperanto daarvoor benut, wat gecorrespondeerd, vertaald, gestudeerd, maar van verreweg de meesten kunnen we zeggen, dat zij, na enige vruchteloze pogingen „bij te blijven", het voorlopig maar hebben opgegeven, evenwel met het voornemen, zodra het „terrein weer veilig is", de studie met alle kracht op te nemen. En zo hebben we allemaal wat taalkennis ingeboet en zijn in ervaring armer geworden. En het zijn niet alleen de beginnelingen, wier studie is onderbroken, maar ook meer gevorderden en zelfs velen onzer bekwaamsten zullen moeten erkennen, dat zij, op z'n zachtst gezegd, er niet op vooruit zijn gegaan.

Nu is het evenwel zaak dat alles weer in te halen; en het is de taak van cursusleiders en andere bekwamen hun medeleden hierin de behulpzame hand te bieden. In de circulaire, waarin het hoofdbestuur tot hernieuwde activiteit opwekt, worden de functionarissen op hun post geroepen. Laat dit ook gelden voor onze cursusleiders; het geldt ook voor de redactie van „La Progresanto", wier taak het is bij de studie hulp en raad te verlenen. Als redactie van L.P. hebben we ons dan ook onmiddellijk aangemeld, maar helaas.... wij zijn er wel, maar onze post is er nog niet, m.a.w.: L.P. kan voorlopig nog niet verschijnen. We staan dus voor de grote moeilijkheid voorlichting, raad en hulp bij de studie te verschaffen, zonder daarvoor over een orgaan te beschikken, want de ruimte in L.E. zal wel voor andere doeleinden beschikbaar moeten blijven. Hoe de redactie dan toch in die behoeften zal trachten te voorzien, is nog niet te zeggen; maar men zij er intussen toch van verzekerd, dat al het mogelijke zal worden gedaan om de Esperanto-kennis onzer leden weer zo spoedig mogelijk op peil te brengen, en dan dat peil weer zo op te voeren, dat onze Federatie, ook wat de taalkundige waarde harer leden betreft, na de oorlog weer haar vooraanstaande plaats in de nederlandse Esperanto-beweging zal innemen en blijven bezetten.

Voorlopig zende men verzoeken om oplossing van taalmoeilijkheden, om raad bij studie, aangaande literatuur e.d. aan het oude adres (Rietstraat 40, Utrecht). Ook zijn we bereid eventuele vertalingen e.d. te corrigeren, maar met dit laatste overlade men ons voorlopig niet, omdat we nog geen gelegenheid hebben gehad onderling overleg te plegen. Voor antwoord sluite men postzegel in.

En intussen zal de redactie van L.P. zich voorbereiden op de heruitgave van ons studieblad, waarnaar ongetwijfeld door al onze leden verlangd wordt. Voorlopig verheugen we ons in de herleving van L.E., maar daarmee zijn we niet tevreden: we verlangen ook naar onze andere uitgaven. Mocht men bepaalde wensen hebben omtrent de inhoud van L.P., dan geve men ons die tijdig te kennen. Intussen wensen we onzen leden van harte succes bij hun hernieuwde studie.

Voor de redactie van
„La Progresanto",

G. J. DEGENKAMP.

Laboru laŭplane!

Nia liberiĝo el sub la naci-socialisma jugo kompreneble ĝojigis ankaŭ min, esperantiston. Pro tio mi, eksciinte, ke kelkaj sekcioj rekomencis sian laboron, tuj decidis viziti ilin.

Estis agrable, troviĝi post kvar jaroj denove en rondo de samcelanoj. Mi kredas, ke malmultaj membroj ignoris la alvokon de sia sekcia estraro, ĉar la kunvenoj estis bone vizitataj. Ĉie regis entuziasmo kaj montriĝis la volo labori pli fervore, pli sisteme kaj pli praktike ol iam ajn antaŭe. Oni volas iri novajn vojojn kaj eviti la erarojn de la pasinteco.

Iri novajn vojojn kaj eviti la erarojn de la pasinteco. Jen, kion mi tre aplaŭdas, sed.... por efektivigi tion oni bone komencu!

Grava kondiĉo por bona komenco estas **plano.** Mi konstatis, ke en kelkaj sekcioj oni kunvenis sen plano, sen programo, lasante al la hazardo la aranĝon de la kunveno. Tio ne estas ĝusta. Kian ajn celon la kunveno havu, la estraro ĉiam faru **ian planon,** kiun ĝi ellaboru tiel, ke de unu kvaronhoro ĝis la sekvonta okazos **io bone preparita.** Neniam la estraro kalkulu eĉ por kvin minutoj je la hazardo, ĉar tio plej ofte fuŝos la kunvenon. Ĝi bone preparu la programon, bone preparu ankaŭ la programerojn, unuvorte: ĝi **gvidu** la kunvenon de la komenco ĝis la fino.

Se la hazardo efektive donos por certa parto de la vespero alian kaj pli bonan programeron, ĝi povos facile forlasi ion el la origina programo kaj doni lokon al tio, kion la hazardo prezentis.

La konversaciaj vesperoj estas malfacila problemo, sed la unua paŝo por solvi ĝin estas la preparo de la programo. Oni elektu en la sekcio komisionon, kiu okupu sin pri la aranĝo de la kunvenoj. La anoj, kiuj prenas sur sin prizorgi parton de la programo, serioze konsideru sian taskon kaj bone preparu sin, eĉ se ilia rolo daŭros nur kvin minutojn. La komisiono zorgu pri „rezerva programo" kaj „rezervaj programeroj", kiuj efektiviĝu, kiam pro ia kaŭzo la planita programo aŭ programero ne povos okazi.

Nur tiel agante ni kreos la eblecon fari niajn kunvenojn allogaj kaj interesaj.

F.

Bestuursmededelingen

Op mars naar herstel.

Wij kunnen thans mededelen, dat ons ledenaantal steeds stijgt en reeds het cijfer van het jaarverslag over 1940 benadert. Telden we toen 1881 leden in de afdelingen en 47 algemene leden, nu bedraagt dit resp. 1744 en 56. Heropgericht zijn 63 afdelingen in 49 plaatsen, terwijl wij over 13 andere plaatsen berichten binnen kregen waar men bezig is wederom groepen te vormen.
Enkele afdelingen hebben hun oude ledenaantal weer bereikt of zelfs overschreden, ook zelfs het stemmenaantal dat ze nog op het congres in 1940 vertegenwoordigden, dat nog gunstiger is dan ultimo December van dat jaar. Wij noemen in dit verband de afdelingen Amsterdam XVII, Andijk, Bussum, Dordrecht, Groningen, Heerlen, Vlaardingen en Zaandam.
In het volgend nummer van L.E. hopen wij de stemmenaantallen op te nemen voor ons a.s. congres. De afdelingen, die nog geen ledenlijst inzonden moeten dit alsnog zonder verwijl doen. Inzenden: F.L.E., Vier Heemskinderenstraat 53², Amsterdam-W.
Met onze belgische afdelingen hebben we nog steeds geen contact kunnen krijgen. In enkele streken van ons land heeft men met grote moeilijkheden te kampen tengevolge van de door de oorlog aangerichte schade. Van overal ontvangen we echter hoopvolle berichten.

Congres.

De amendementen moeten uiterlijk 15 September in ons bezit zijn. We zullen trachten L.E. in September zo vroeg mogelijk te laten verschijnen. Mocht onverhoopt echter dit niet uitvoerbaar blijken, dan zullen wij de afdelingen de binnengekomen amendementen zo nodig apart toezenden.

Propaganda.

We verzoeken den afdelingsbesturen ons een exemplaar van hun propaganda-uitgaven, die zij zelf verzorgen, b.v. vlugschriften, propaganda-platen, uitnodigingen, zo ook krantenartikelen, enz., aan ons te willen doen toekomen. Mogelijk zijn er voorbeelden bij waar andere afdelingen hun voordeel mee kunnen doen.

Corresponderen met het buitenland in Esperanto.

Geruime tijd geleden heeft ons bestuur zich reeds tot den Dir. Generaal van de P.T.T. gewend om toestemming te verkrijgen tot het gebruik van Esperanto in buitenlandse correspondentie. Tot op heden mochten wij echter nog geen antwoord hierop ontvangen. Wij hebben ons daarom nogmaals tot den D.-G. gewend. Van niet officiële zijde ontvingen wij thans bericht dat het Esperanto nu zou zijn toegestaan. Officieel is ons echter hieromtrent niets bekend. Wel lazen we in de bladen dat het verzenden van drukwerk naar het buitenland wederom is toegestaan.

Ricevitaj donacoj.

Danke al la donacintoj ni notis jenajn ricevitajn sumojn por la rekonstruo de nia Federacio:
Distrikto A'dam f 54.02; J. H., Dordrecht f 10.—; t. Br., Enschede f 35.20; J. P. Zwanenburg f 1.—; sekco Heerlen f 100.—; sekcio Zwolle f 100.—; J. L., de Bilt f 1.20; sekcio Oostvoorne f 15.—; J. S., Putten f 50.—; sekcio Bussum f 5.50; K. d. B., Enschede f 1.—; sekcio Enschede f 25.—; sekcio Sliedrecht f 16.50; O. v. W., 's Heer Arendskerke f 0.40.
Entute f 414.82.
Trafis nin i.a. la letereto de nia plej juna donacinto, kiu tekstas jene: Tiu ĉi mono estas el mia ŝparkesto por la Federacio.

(subskribis) K. d. B.
(11 jara).

KASISTO.

A'DAMAJ S.A.T.-ANOJ ATENTU !

Ĉar Aŭgusto ĝenerale estas feria monato, la unua A'dama S.A.T.-kunveno okazos en la monato Septembro.
Ni do atentu tiurilate, lokon kaj daton en L.E. Nepre vizitu la kunvenon, ĉar grava estas ĝia programo.
Anoj, eksanoj kaj aliĝontoj, ĉiuj estos bonvenaj!

La urba perantino
H. OUDENHOOVEN-BISHOFF,
Bestevaerstraat 127³, A'dam-W.

Esperanto in de pers

Hoewel onze persdienst nog niet functionneert tengevolge van de onvolledige berichtgeving uit het buitenland, verschenen er toch reeds enige belangrijke artikelen over Esperanto in enkele bladen. Zo lazen wij in „De Vlam" een interessant artikel „Internationalisme en de Internationale taal", dat alleszins lezenswaard is, zo ook een artikel in „Spartacus". Enkele kleinere berichten zagen wij nog in plaatselijke bladen. De leden die hiervoor zorgden, gaven een goed voorbeeld.

PETO.

Por mia artikolaro „Esperanto en Nederlando" mi volonte ricevu informojn pri la temo „Esperanto dum la milito" (privata aŭ organiza propagando aŭ instruo, neordinaraj okazajoj, spertoj, utilo aŭ malutilo ktp.)

G. P. DE BRUIN,
Preangerstraat 35, Enschede.

UIT DE DISTRICTEN

Distr. ZUID-HOLLAND.
Sekr.: Frankendaal 135, Rotterdam-Z.

La distrikto Sud Holanda restariĝis, la sekretario ankoraŭ estas F. H. Koppenjan.
Sekretarioj de sekcioj en la distrikto informu lin pri viaj adresoj, por ke li povu korespondi kun vi.
Se eble sendu sciigindaĵojn, por ke baldaŭ reaperu „Nova Epoko".

F. H. Koppenjan.

Korespondanonco

K-do M. P. Bolies,
Bakendorp D 12, Baarland (Zld.)
terkulturisto deziras amike korespondi kun urba kamarado pri la kontrasto inter urbo kaj kamparo.

Volgend L.E.

verschijnt zo mogelijk 25 Augustus. Copy gelieve men ons vóór de 12e te doen toekomen. Men gelieve slechts één kant van het papier te beschrijven.

UIT DE AFDELINGEN

AFD. ROTTERDAM II.
Sekr.: Lange Hilleweg 203 b.

La 26an de junio nia sekcio refondiĝis. Anoncis sin en tiu kunveno 29 anoj, multaj eksanoj, sed ankaŭ multaj, kiuj lernis la lingvon en alia movado. Ni tre ĝojis, ke anoncis sin ĝek-doj, kiuj jam antaŭ la milito forlasis nian Federacion.
La anoj elektis por la taga estraro jenajn k-dojn: prez.: C. v. Essen; sekr.: A. Vollegraaf, Lange Hilleweg 203 b; kasisto: A. Pols, Dubbelstraat 23 a.
Ĉar kelkaj aŭtaŭmilitaj anoj ankoraŭ ne anoncis sin, la kunveno elektis propagandkomitaton, kiu komitato entusiasme eklaboris. Tial ne daŭros longe kaj ni atingos la membronombron de 100.
Ni sukcesis denove lui nian antaŭan salonon kaj ni fiksis jenan programon ĝis oktobro: mardvespere ni konversacios kaj ĵaŭdvespere la anoj havos la okazon refreŝigi sian scion pri nia lingvo en ripetkurso.
Ĉiuj kunvenoj do okazos en nia salono: Stryenschestraat 65.
Nia biblioteko tute perdiĝis. Ĉiun anon, kiu posedas du ekzemplerojn de iu libro, ni petas donaci unu al la sekcia biblioteko, por ke ni baldaŭ povu disponi pri libraro, konvena al granda sekcio.

A. Vollegraaf, sekr.

AFD. AMERSFOORT.
Sekr.: Vermeerstraat 16.

La 2an de julio ni denove kunvenis. Partoprenis 22 anoj, forestis 11. En la malferma parolado la prezidanto instigis la anojn persiste labori por nia idealo.
La estraro konsistas el jenaj anoj: prez. H. Hottinga, sekr.-ino, P. Poort-Procée, kasisto H. Hazeleger, 2a prez. J. A. Roskam, 2a sekr. A. J. Boon.
Ni decidis okazigi kurson por komencantoj en septembro, kaj por refreŝigi niajn cerbojn kurson por progresantoj, kiun gvidos k-dino J. v. d. Snoek kaj k-do J. A. Roskam. ĉiun lundon.

P. Poort-Procée, Sekretarino.

AFD. HEERLEN.
Sekr.: Vorstenstraat 60.

Dimanĉon, la 15an de julio niaj ĝekamaradoj el Sud-Limburgo kunvenis kun edzinoj kaj infanoj en Schin op Geul. K-do Nijboer, kiu loĝas tie, invitis nin. Proksimume kvindek personoj ĉeestis. La vetero estis tre bona kaj nia k-do Nijboer gastame akceptis nin. K-do Margaroli rakontis pri sia vivo en diversaj koncentrejoj. Kaj ni entute pasigis tie agrablan tagon apud la Geul. La ĉeestantaj estraanoj priparolis la restarigon de la distrikto kaj decidis kunveni la 5an de aŭgusto por elekti distrikt-estraron, ĉar neniu el la malnovaj estraranoj restis.

J. S.

AFD. LEIDEN.
Sekr.: Anna Paulownastraat 50 A.

Tuj post la liberiĝo de nia lando, ni senprokraste aktiviĝis por energie revivigi nian unuiĝon. La rezultato estis tre kontentiga. Jam en nia unua vespero aliĝis 6 eksanoj kaj 3 novaj. Sed ne nur la anarnombro ĝojigis nin, sed precipe ankaŭ la sfero. Mi povas aserti, ke ĝi neniel pro la devigita disiĝo malboniĝis. Tio estas tre grava, eĉ signifas ĝajnon. Ni tamen, kompreneble, ne rifuzos novajn anojn, male klopodos ĉiel kaj entreprenos ĉion por varbi pli da ili. Mi kaptas nun la okazon por instigi niajn membrojn propagandi kie ajn ili troviĝas. Komplimenton al ili, kiuj jam memstare sukcesis noti unu aŭ pli kandidatojn.
La 20an de julio ni invitis la aliajn esp.-grupojn en Leiden al nia salono por okazigi „Komunan Vesperon"; nome la neŭtralan „Pacen", la katolikan „Estonto estas nia" kaj nian „Fajreron". Ni tre ĝuis pro la deklamado, muziko, kantado, teatraĵoj, k.t.p.
Dankon al ĉiuj kunlaborintoj, kiuj sukcesigis tiun agrablan vesperon. Apartan dankon al la iniciatintoj, k-doj S. Serdijn kaj G. de Boer.

M. Kokkedee, sekr.

DRUK DICO — AMSTERDAM